

V-19119/14 (1952)
OOMOTO

MONATO DE OOMOTO



1952 **3-4**

*14-a Jaro (N-ro 141-142) Administracio: Kameoka, Kioto-hu, Japanujo
Abonprezo: ¥360 por unu jaro; \$ 1.20 aŭ 18 Steloj por eksterlando: Abonebla
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Rionustraaf 172, Den Haag, Nederlando.*

Nia Gvidanto Sumiko Deguĉi Forpasis

Kun funebra sento ni anoncas al la 100,000 Oomotanoj enlandaj kaj eksterlandaj, kaj al ĉiuj simpatiantoj de nia movado, ke nia respektata kaj amata Gvidanto, S-ino Sumiko Deguĉi, forpasis ĉe Kameoka, je 8.25 a.t.m., la 31-an de Marto, 1952.

De kiam ŝia edzo, Majstro Onisabro Deguĉi, forpasis en 1948, kaj ŝi prenis sur sin la gravan rolon de l' spirita gvidanteco de Oomoto kaj Universala Homama Asocio, ŝi dediĉis sin al la sukcesa antaŭenpuŝo de la Sankta Afero kun la administracia subteno de Prezidanto Isao Deguĉi, ŝia bofilo.

Komence de tiu ĉi jaro ŝia sano difektiĝis pro kormalsano kaj astmo. Ne ĉiam ŝi kuŝis en la lito. Ŝi loĝis aŭ en Kameoka aŭ en Ajabe pasigante senĝenajn tagojn por resaniĝo. Ni esperis, kaj kredis, ke ŝia resaniĝo estas proksima. Tamen, en la lasta tempo ŝia malsano fariĝis subite grava, kvankam ne kriza. La 30-an vespere nenio estis eksterordinara. Ŝi eĉ prenis iom da pomosuko "kun bona gustumo." Trankvila estis ŝia dormado tra la nokto. Vekiĝinte je 6.30 la sekvan matenon, ŝi volis preni matenmanĝon. Sed antaŭ ol preni manĝeton, ŝi ankoraŭ deziris "plu dormeti." Ŝi endormiĝis. Sed tiu endormiĝo estis ja la eterna disiĝo de ni. Paca estis ŝia forpaso. Ŝi estis en la aĝo de 69 jaroj.

S-ino Sumiko Deguĉi postvivis la edzon je kvar jaroj kaj ĝisvivis la 60-jaran Jubileon — la periodo plej grava por la Restariĝo de l' Oomoto-movado. Jam konstruita estas la firma bazo sur kiu la movado nur povos antaŭenmarŝi stabile. Kredeble ŝi estis kontenta, ke ŝi sukcese plenumis sian mision sur la tero.

La funebra ceremonio okazos en Ajabe, je 1 p.t.m., la 10-an de Aprilo.

La 31-an de Marto, 1952

LA CENTRA OFICEJO DE OOMOTO KAJ U. H. A.

“Dua Majstrino”

La estreco de l' Oomoto-religio herediĝas sinsekve laŭ la virina linio, kiel la Fondintino de Oomoto destinis en la Sankta Skribo. S-inon Sumiko Deguĉi ni nomis “Dua Majstrino” post la “Unua” — Fondintino Nao Deguĉi, ŝia patrino.

4 feb., 1883, Sumiko naskiĝis la lasta filino de Nao Deguĉi, ĉe Ajabe en la gubernio de Kioto. Jam de frua knabineco ŝi devis labori kiel vartistino, aŭ servistino por fremdaj familioj, ĉar ŝia patro, ĉarpentisto, kuŝis longe malsana kaj ŝia patrino devis vivteni grandan familion. Kiam ŝia patrino estis “posedita de Dio” en 1892, ŝi ankoraŭ estis naŭ-jara.

1 jan., 1900, ŝi edziniĝis kun Kisabro Ueda, kiu adoptiĝis en la Deguĉi-familion per la nova nomo Onisabro Deguĉi. Onisabro per mirindaj inspiroj kaj revelacioj ne nur sistemigis la vastan organizon de la Oomoto-movado, sed ankaŭ fondis la Universalan Homaman Asocion por internacia agado. Malantaŭ li kuŝis ĉiam modesta subteno de Sumiko.

En 1921, la Oomoto-movado renkontis la *unuan* persekuton de la japana registaro. Ŝia edzo, Onisabro, enkarceriĝis 126 tagojn. Sumiko zorgis la hejmon kaj tenadis la torĉon de la Sankta Afero dum lia foresto.

En 1935, nia movado renkontis la *duan* persekuton de la registaro. Ŝi kun la edzo estis arestita kaj devis resti en la karceri dum sep jaroj. Ili estis reliberigitaj en 1942.

En 1946, Onisabro refondis la Oomoto-religion. Post lia “ĉieliro”, 19 jan., 1948, Sumiko prenis sur sin la gvidantecon de la movado.

8., dec., 1949, Sumiko refondis la Universalan Homaman Asocion. 31 marto, 1952, ŝi “ĉieleniris” ĉe Kameoka.

Kelkaj Rememoroj pri Dua Majstrino

Kiom ajn alta fariĝus la homa civilizo kaj kiom ajn progresus la maŝinteknikoj, la homaro ne povus vivi sen la Tero, sen la Suno kaj sen la Akvo. Neniu alia en la mondo pli laŭdis, kaj instruis danki la Naturajn Elementojn, ol ŝi!

Granda kiel la Tero estis ŝia fido al Dio. En tiu fido estis



Dua Majstrino Sumiko Deguĉi
1883–1952

enradikita ŝia tutkora optimismo. Ĝi estis konstanta kaj egala eĉ dum la karceri vivo de sep longaj jaroj. Ŝian koron neniom povis kateni eĉ la feraj bariloj de l' karceri. Kontraŭe, ŝi verkis poemojn trankvile, en kiuj estas respegulita ŝia anĝele naiva sed granda koro.

Tre vasta estas mia koro

For de la mondo malfacila,
Mi vivas en karcer' trankvila:
Eĉ se leviĝo, kuŝ', movado
Ne estas tute laŭ la volo,
Tre vasta estas mia koro.

Hodiaŭ ankaŭ tutan tagon
Pasigis mi legante l' agon
De Reukan kun intereso:
Kun li mi jen interparolis,
Paserojn ankaŭ mi petolis.

Mi floron lasis kaj reprenis,
Kaj en akvujo nun entenis;
Respegulitan en la akvo,
Mi ĝin rigardas des pli bela,
Kunulo mia, ho fidela!

Nu, venos morgaŭ mia filino:
Dezirojn havas mi sen fino,
Por aŭdi ŝin kaj diri al ŝi;
Paperpecetojn al la floro
Kunligu mi pro la memoro.

Por atendi — sen forges'
Unu, du, tri, kvar, kvin, ses...

En la karceron de Kioto, ŝi interparolis kun birdoj kaj insektoj.
Ŝi amis la verŝajne geedzan paron de blatoj, kiuj vizitis ŝian
ĉambron ĉiujare. Post kiam ŝi estis translokita en la karceron de
Osaka, ŝi rememoris ilin versfarante:

Kvazaŭ mia frat'
jarojn vivis vi kun mi,
karmemora blat'!
Kiel fartas karulin'?
Ĉu jam idoj svarmas ŝin?

Kvankam ĝentila kaj sufiĉe maljuna laŭ aĝo, ŝi tamen estis
treege aŭdaca kiam ŝi estis sub inspiro. Tuj post kiam ŝi refondis
la Universalan Homaman Asocion, ŝi esprimis ardan deziron for-
vojaĝi eksterlanden kun la celo persvadi S-rojn Truman kaj Stalin,
ke "ili manpremu unu la alian por la feliĉo de la tuta homaro."
Estis en tiu tempo, ke ŝi faris poemon jenan:

La Edena rond'
ekaperus tuj sen dub'
tra ĉi tiu mond',
Se l' tutpovon por milit'
vi nur uzus por karit'!

Kiel la arta genio de l' edzo, ŝia ankaŭ estis multflanka:
poemfarado, kaligrafio, desegnado. Dum ŝia edzo plej amis ceramikon,
ŝi plej ŝatis manteksadon. Ŝia manteksado estis io pli ol simpla
ŝatokupo — io simbola:

Fadenojn en tord'
mi zorge nun malplektas
por meti en ord':
brokaton de l' mondopaco
el ili mi plu teksas.

Laborante super ŝpinilo kaj teksilo, ŝi ofte pripensis sian edzon
kaj Gandhi:

Mem Gandhi ankaŭ
ŝpinilan turnis radon:
nun mi hodiaŭ
ligante la fadenojn
sopiras Kamaradon.

Gandhi sen perfort'
pro maksim' kaj kun maltim'
bravis ĝis la mort';
ja kun li — samidean'
edzo mia, Grandanim'.

Dua Majstrino — ŝi estis la simbolo de gajhumoro kaj
optimismo. Kaj tia ŝi restos por eterne en nia memoro. Kleruloj,
politikistoj, ekonomiistoj, simplaj laboruloj, ĉiuj, kiuj venis al ŝi,
egale estis inspiritaj de ŝia granda animo kaj figuro. Eĉ inter fremduloj,
kiuj loĝas en nia lando, estis tre intimaj amikoj. Unu el ili skribis al
ŝi longan leteron datitan je Marto 8. Ŝi skribas ĉe la fino:

"Baldaŭ ĉerizfloroj aperos en Kameoka. Mi rememoras al mi vian
ĉarman ĝardenon, la pacon kaj kvieton de via hejmo, sed el ĉiuj ceteraj
mi plej rememoras al mi la sinceran amikecon, kiun mi ĉiam trovis
en via vizaĝo, kiu donas al mi inspiron por daŭrigi mian laboron tie ĉi."

Bedaŭrinde la Dua Majstrino ne povis mem skribi respondon
al la sendinto de tiu ĉi afabla letero kiel ŝi ĉiam faris ĝis nun
propramane. Estis kun profunda ĉagreno, ke anstataŭ ŝi, ni devis
skribi respondon informante ŝian neatenditan forpason! (T. N.)



Poetino Naohi

La modesteco de Sino Naohi Deguči ne permesis al ni ĝis nun publikigi ŝian portreton kaj ŝiajn artverkaĵojn sur la paĝoj de nia gazeto. La fakto, ke ŝi neniam portis sur si eŭropan vestaĵon ne signifas, ke ŝi malŝatas eŭropajn aferojn, sed laŭ sia naturo ŝi profunde amas pure japanajn. Ŝia arto konsistas en ceramiko, botaniko, *tanka*-pocemfarado, kaligrafio kaj desegnado. Ŝi bedaŭras kaj sopiras iom post iom perdatajn bonajn elementojn el la japana vivo — precipe virina. (La foto montras S-inon Naohi Deguči laboranta super tortiro.)

*

Naohi Deguči heredis Gvidantecon

Sino Naohi Deguči, la unua filino de l' forpasinta Majstrino, prenis sur sin la gvidantecon de la Oomoto-movado, la 31-an de Marto, 1952.

Naskita inter Majstro Onisabro Deguči kaj S-ino Sumiko Deguči, la 7-an de Marto, 1902, ŝi pasigis la knabinajn jarojn kun la avino, Fondintino Nao Deguči, en la lulila periodo de la Oomoto-movado.

En la sekvinta periodo, tre prospera sed parte martira, dum la vivo de ŝiaj gepatroj, ŝi por ĉiam restis post la kuliso sin okupante pri la studo de diversaj artoj.

La 4-an de Feb. de tiu ĉi jaro, ŝi prenis sur sin la oficon de la vicprezidantecon por helpi la patrinon.

La ĉifoj enoficiĝo de S-ino Naohi Deguči je la plenrajta gvidantecon estas la plenumiĝo de la vortoj de la Sankta Skribo kiel la mejloŝtono bonaŭguranta por la glora epoko de nia movado.

Dediĉe al OOMOTO Sesdek-jara Jubileo

La sesdek jarulon elkore gratulas
finlanda dankema leganto.
Vi semas semerojn de paco kaj amo,
de Dio vi estas peranto.
Do kresku kaj floru movado benita
kaj paco kaj vero
ekregu sur tero!

Erkki Mansikka
Vaasa, Finnlando

*

Okaze de la 60-jara Jubileo de via movado mi sendas al vi miajn plej varmajn gratulojn kaj deziras al vi la plej grandan sukceson dum la jubileaj tagoj kaj en la ESTONTO.

Malgraŭ ke mi ne tute konas vian movadon, ĉar mi nur legis kelkajn numerojn de via Esperanta gazeto, mi ja bone komprenas ke vi laŭ via scio kaj povo laboras por la disvastigo de la bono en la mondo. — Momente ankoraŭ estas mallume en la mondo, sed iom da lumo jam penetris la antaŭkurtenojn, kaj estas pli kaj pli lume en la mondo. — Ni ja devas *alkutimiĝi* al la lumo. — Niaj "okuloj" ne povas subite vidi la grandan "Lumon". Se ili ĝin subite vidus, ili blindetiĝus.

Gunnar Rugland
Nacka, Svedujo

*

Mi estas feliĉa ke mi ekkonis la Oomotismon. Mi sendas la bondezirojn al via movado kaj deziras al vi plenan sukceson en viaj penoj por la rekonstruo de via movado, tiel kruele kaj malice detruita de viaj enlandaj faŝistoj. Vivu via nobla

agado por la paco kaj la frateco inter la popoloj. Vivu la libera kaj progresema Japanujo.

Josefo Arszennik
Warszawa, Polujo

*

Okaze de la 60-jara Jubileo de "OOMOTO" en 1952, la tuthelena Esperantistaro sendas al ĉiuj Geomotanoj siajn plej elkorajn kaj Samideanajn Gratulojn!

D-ro *Anakreon A. Stamatiadis*
Prez. de "Supera Helena Esp. Instituto" kaj de "Helena Esp. Asocio"
Ateno, Grekujo

*

Al Oomoto mi speciale sendas miajn tutkorajn gratulesprimojn pro la 60-jara jubileo kaj deziras bonan prosperon dank' al ĝia altmorala percepto pri la estontaj tempoj. Ĝi helpu feliĉigi siajn samlandanojn same kiel la tutan homaron.

Oskar Sinner
Wien, Aŭstrujo

*

Mi volas gratuli vin okaze de via 60-jara jubileo en tiu ĉi jaro. La alta idealo, kiun vi disvastigas pere de via revuo estas vere subteninda. Mi deziras ke la Oomoto-movado estos disvastigita inter la tuta esperantistaro kaj via revuo prosperu.

O. N. Ihrborn
Klagerup, Svedujo

EL LA RAKONTOJ EL LA SPIRITA MONDO ĈIELA FLORO

Onisabro Deguĉi



Pri LA RAKONTOJ EL LA SPIRITA MONDO

En la vintro de 1898, Kisabro Ueda (la nomo de Majstro O. Deguĉi en la juneco) estis kondukita de anĝelo sur la monton Takakuma [en] sia naskiĝloko, kaj plenumis unu-semajnan ĉefe spiritan asketismon. Kun lia fizika korpo sidanta sur roko, nur lia spirito estis enlasita en la Spiritan Mondon, kie li travidis la misterajn interrilatojn de la mondoj fizika, infera kaj ĉiela kontraŭ la fono de ĉiuj tempoj estinta, estanta kaj estonta.

Liaj travivaĵoj dum tiu spirita aventuro neniam estis malkaŝitaj al aliaj ĝis 1921, kiam Dio ordonis, ke li jam publikigu la revelaciojn, kiujn Li donis al li dum lia spirita asketismo antaŭ dudek kvar jaroj.

LA RAKONTOJ EL LA SPIRITA MONDO estis skribita sub diktado de Majstro O. Deguĉi sur la bazo de tiuj spertoj, kiujn li observis en la Spiritita Mondo, konsistanta el tri mondoj, fizika, infera kaj ĉiela. Ĝi konsistas el 81 volumoj kaj ĉiu volumo enhavas ĉ. 400 paĝojn en formato 12 × 18.5 cm. Same kiel la SANKTA SKRIBO de l' Fondintino, LA RAKONTOJ estas la Biblio de Oomoto kaj la dua estas la Klariganto de la unua.

Estas nature, ke la Rakutenŝa, Arta Fako de Oomoto, havas la organizon de teatra trupo por prezenti ne nur al Oomotanoj sed ankaŭ al ne-Oomota publiko diversajn scenojn el LA RAKONTOJ. En Tokio lastatempe la lokaj Oomotanoj fondis tian trupon kaj faris tre sukcesan debuton per la prezentado de "Ĉiela Floro" el la 47-vol. de LA RAKONTOJ. Ni ĉi tie publikigas la tradukon de tiu ĉapitro.

La Redakcio

Enkonduko

Propagandisto Harukuniŭake de Ananaiismo (Oomotismo) kaj lia subulo Tacukoo, ambaŭ ekipitaj de nenia armilo, marŝas al la Tendaro de Generalo Ranĉi por "konverti" la malamikojn en la vojon de bonamo. Sed bedaŭrinde ili kaptiĝas je danĝera renversilo

preparita de Ranĉi kaj enjetiĝas en profundan krutejon. Kiam ili tondre falkuŝiĝis sur la teron, ili fariĝas senkonsciaj. Iliaj spiritoj tamen sin trovas en la Tria-Grada Regiono de l' Ĉielregno, kaj vojaĝas en loko tre pitoreska kaj agrabla laŭ la gvido de Anĝelo Kotojoriŭake, kiu venis por gvidi ilin. Tamen tiu ĉi Anĝelo post iom da vojaĝo metamorfozis en lumo-bulon kaj malaperis. Subite lasitaj solaj, ili ambaŭ ne sciis kion fari kaj kien sin direkti. Tiam ili trovis antaŭ si naŭzan mizerulon kuŝanta sur la vojo. Lia tuta korpo estas putranta...

*

En la sekvanta traduko ni faris la mallongigon de la personaj nomoj: *Haru* por Harukuniŭake kaj *Tacu* por Tacukoo.

Tacu (kun miro): — Sinjoro! Tia malpura homa estaĵo ne povus ekzisti en la Ĉielregno. Sendube ni falis en la Inferon pro la fiereco akumuliginta en nia koro! Jen la nigraj nuboj ĉirkaŭvolvis nin kaj la neesprimeble malgaja atmosfero nin premas sufoke.

Haru: — Ne, ne. Ne povus esti, ke ni nin trovas en la Infero. Ni certe estas en la plej malalta regiono de la Ĉielregno. Sed ŝajnas ke ankaŭ en la Ĉielregno foje troviĝas malfeliĉaj homoj, kia estas ĉi tiu sinjoro suferanta de tia abomeninda malsano. Ni devas iamaniere lin savi... Sed la penso ke ni devas lin savi jam estas la fiero pekanta kontraŭ Dio. Ni homoj lasu nin uzi de Dio en Lia Servo, nur kiel instrumentoj inspirataj de la Sankta Dikaraktero.

Harukuniŭake, interplektante la manojn, komencas preĝi al Dio.

Tacu: (Tirante Harukuniŭake ĉe la maniko): — Atendu, Sinjoro! Apenaŭ vi tuŝus tian malpuran estaĵon, via spirita korpo estus ege makulita kaj vi enfalus en la grupojn de la Infero. Lasu lin, mi petas. Estas ja terure!

Haru: — Ne, vi ne estas prava. La Ĉielregno estas la regno de bonamo. La Dikaraktero konsistas en amo kaj kredo. Ni homoj vivas de amo kaj kredo, enfluantaj de Dio. Nia devo estas distribui amon kaj kredon al la tuta homaro sur la tero. Se pro timo al infereniro ni ne savus la kompatindulon, kiun ni renkontis, tio estas egoismo. Egoismo ne estas ebla en la Ĉielregno. Konsentite,

ke tiu ĉi loko situas en la abismo de l' Infero, ni tamen povus ĝin reformi en la Ĉielregnon per la lumo de amo kaj bono.

Tacu: — Via argumento estas sufiĉe konvinka. Sed se nia Spirito, apenaŭ progresinta en la Ĉielregno, estus makulita per kontakto kun tia abomeninda homo, ni ne povus savi ankoraŭ multajn homojn, kiujn ni renkontos kiam ni reiros sur la Teran Mondon. Ni estu pli prudentaj, Sinjoro! Anstataŭ riski nian Spiriton al makuliĝo savante nur unuopan personon, ni nutre bruligu la torĉon de amo kaj kredo por pli multaj homoj! Tio estus multoble pli utila por la Dia Regno. Iom da prudento, mi petas!

Haru: — Ne, vi eraras. Nia amo, se ĝi permesus preterlasi tiun ĉi kompatindan homon senhelpe, neniel povas esti la vera amo devenanta de Dikaraktero, sed nur la memamo devenanta de la Natura Mondo. Ĝi estas la infera amo. Tian hipokritan amon ni ne devas havi.

Ĝuste tiam la mizera homo kuŝanta levis kaj fiksas siajn okulojn al Harukuniŭake.

Mizerulo: — Hej, propagandisto! Vidu, de tia malbenita malsano mi suferas. Mi ĵus falpuŝiĝis kontraŭ roko kaj mia kruro disartikiĝis. Mi baraktas pro dolorego. Venu kaj helpu min por leviĝi.

Haru: — Jes, volonte tuj.



Oomoto-Teatra Trupo de Tokio prezentanta "Ĉiela Floro"

Harukuniŭake rapidas al li por levi lian korpon. Jen, la naŭzaodoro de la korpo sufokas lin. La putra korpo de la mizerulo estas plene kovrita de sennombraj fivermoj, kiuj svarme elrampas el la putraĵoj. Ĉi tiuj vermaĉoj transrampas sur la korpon de Harukuniŭake por kovri ĝin plene.

Tacu: — Ĉesu, Sinjoro! Tenu vin for de tia putriĝinta homaĉo. Li jam ne estas kuracebla. Vidu, lia korpo estas plenplena de larvoj.

Haru (Al mizerulo, en kvieta tono): — Nekonata Sinjoro, mi plene kunsentas vian suferon. Nu, apogu vin sur miaj ŝultroj. Mi estas preta kunporti vin ĝis via hejmo.

Mizerulo: — Ĉu vi estas je mia dispono?

Haru: — Jes, mi estas preta servi al vi per kio ajn ebla al mi.

Tacu: — Sinjoro, vi estu pli saĝa. Vi estas tro bonvolema. Mi scias, ke savi la homojn estas la devo de la propagandisto, tamen kia estas lia aroganteco! Fi, fripono! Li kvazaŭ ordonas vin — sen diri eĉ unu vorton, dankon! Li ofendas nin. Por tia sendankemulo inde meritas tia sufero en la Ĉielregno. Kia ago, tia puno de Dio. La propagandisto tute ne bezonas zorgi tian. Lasu! Fi! Kia odorego! Netolereble!

Mizerulo: — Hej, Tacukoo! Ne bombastu. Venu al mi por masaĝi la piedojn.

Tacu: — Fi! Homaĉo!

Haru: — Tacukoo, mi ordonas vin, ke vi plenumu lian peton masaĝi la piedojn.

Tacu: — Sed... sed...

Haru: — Sed? Kun tia malobeema estulo, kia vi, mi disrompos al ni la ĝisnunan ligon. Jam nenien ni iros kune.

Tacu: — Sed... sed... Sinjoro, kiel mi tamen povus...

Mizerulo: — Nu, Tacu, leku mian kokson, rapidu!

Tacu: — Eh, Diablo vin prenu! Mi preferus morton al kiso je via kokso. An, an, an!

Mizerulo: — Vi, hipokrito sub la masko de bono! Vi ankaŭ estos atakita de tia malbenita malsano, kia la mia. Ĉu vi ne hontas?

Tacu: — Mi... mi... ne... neniam faris mal... malbonaĵon, kiu meritis kondamnon al tia malsano. Ne klaŭu. Vi uzas mian mastron kvazaŭ serviston por flegi al vi. Sinjoro, ni lasu lin por ĉiam!

Haru: — Nenio estas ekster Dia Favoro. Nia proverbo diras, ke eĉ manikoj ne intertuŝas sin reciproke sen la (homa) spirita ligiteco en la antaŭa vivo. Ni ne renkontis la mizerulon laŭ la hazarda ludo, sed laŭ la aranĝo de Dio. De kiam mi estis plenigita de Dia Amo, mi sentas neniom da malsato kontraŭ homo, kia ajn abomena li estus! Mi estas plena nur de dankemo. Vi ankaŭ profitu ĉi tiun okazon kaj flegu ĉi tiun sinjoron, tiel ke via peko estu pagita.

Mizerulo: — Hej, Harukuniŭake, leku nun miajn plandojn. Ŝajne ili estas plenaj de pusto. Estas necese, ke oni ilin elsuĉu, por ke mi povu ekstarti sur miaj piedoj.

Haru: — Jes, kun dankemo mi servos al vi.

Harukuniŭake almetas sian buŝon al la plando de la mizerulo kaj komencas suĉi. Nu, Tacukoo, ege incitita, donas al la mizerulo subitan vangofrapon kriante, "Sendeculo!" Ĝuste en tiu momento, la diabla figuro de la mizerulo abrupte aliformiĝis en gracian anĝelinon. Tiu ĉi ekparolas kun dolĉa rideto sur la vizaĝo.

Anĝelino: — Estas brave, Harukuniŭake, ke vi proprigis al vi la Dian Amon en la perfekta grado. De nun, ni faru kune vojaĝon tra la Ĉielregno. Ni lasu tian senkorulon, kia estas Tacukoo.

Haru: — Malgraŭ viaj vortoj, mi ne povas postlasi Tacukoo, kiu estas kompatinda morala kriplulo. Se ne estas permesate, ke mi migru kune kun li la Ĉielregnon, mi ne volas iri. Ĉar ni ambaŭ ĵuris vivi la komunan vivon en plezuro same kiel en sufero. Mi petas, ke vi bonvolu iri sola.

Anĝelino: — Prave! En vi la Dia Amo jam manifestas sin perfekte, kiel mi konstatis. Brave, brave, Harukuniŭake! Nu, mi prezentas min al vi: mi estas Anĝelino Konohana de la Monto Tenkjoo.

En granda miro Harukuniŭake retiras sin kelkajn paŝojn malantaŭen, kaj metante ambaŭ manojn sur la teron, riverencas kaj momente sin fordonas al dankema larmado, kiu ne permesas lin

diri eĉ unu plian vorton.

Konohana (En milda voĉo): — Mi tre ĝojas, Harukuniŭake, ke vi fine sukcesis nutri en vi perfektan bonon. Certe kontenta estas ankaŭ la Granda Dio, mi supozas. Mi nun malkovras al vi, ke Kotojoriŭake, kiu aperis antaŭ vi (en la antaŭa ĉapitro — Noto de l' Trad.) estas la Prapatra Dio de la Granda Tero en aliformo.

Haru: — Mi dankas. En la komenco mi, havante ne sufiĉe da saĝo kaj inteligento, ne povis rekoni kaj prenis lin por Kotojoriŭake kia li aperis, sed poste mi ekrimarkis, kvankam malklare, ke li estas la aliformiĝo de Dio, kaj ke ĉio estas aranĝita de Dio por provado al ni. Pro dankemo mi ne povas deteni ĝojlarmadon. Mi humile petas, ke vi bonvole favoru ankaŭ Tacukoo, same kiel min, per via zorgado.

Konohana: — Kara Tacukoo, mi vin admiras pro via lojaleco al via mastro. Se vi ankoraŭ iom pli nutros amon en via interno, vi ankaŭ povos tute senĝene vojaĝi la Ĉielregnon sen "vualo". Tamen, via sincera lojaleco al via mastro ja plene kompensas la mankon de via amo. Estu do trankvila kaj rondiru la Ĉielregnon, penante ankoraŭ ĉiam pli poluri al vi la animon.

Tacu (Plorsingultante pro forta emociiĝo): — Mi tutkore dankas vin pro viaj afablaj vortoj. Laŭ via permeso mi havos la plezuron vin sekvi tra la Ĉielregno.

Konohana: — Ĉi tie estas la plej malalta regiono de la Ĉielregno. De nun mi kondukos vin al la meza regiono de la Ĉielregno. La saĝo kaj inteligento de l' anĝeloj en la meza regiono estas dekmiloble pli lumaj ol tiuj en la plej malalta regiono de la Ĉielregno. Tial, sen dekmiloblo da bonamo kaj verkredo, saĝo kaj inteligento, se iu enirus tien, liaj okuloj blindiĝus, lia kapo turniĝus, kaj li fariĝus duonmortanto, preskaŭ svenante. Tacukoo jam havas la "vualon" kaj kun ĝi li povos senĝene travojaĝi la mezan regionon de la Ĉielregno. Harukuniŭake sen tio ne povos. Jen estas unu por vi.

Tion dirinte Konohana surmetas ĝin sur la vizaĝon de Harukuniŭake. Ili ĉiuj sagra rapide marŝas en la orientan direkton.

Ah, Kan'nagara Tamaĉihaemase!

(Diktita 9 Jan., 1922.)



Aŭskultu, la Voĉojn de Oceano!

“Aŭskultu, la Voĉojn de Oceano!” estas la titolo de unu el la plej vaste venditaj libroj post-militaj, pri kies esp-ardo eldono (en parta traduko) ni detale recenzis en nia lasta numero.

La supra foto montras la sud-maran insulon Iŭojima, kie proksimume 20,000 japanaj soldatoj pereis en la fina stadio de l' Pacifika Milito en 1945.



Aŭskultu, kion dirus la kranioj!

La Japana Konstitucio

(Ekstraktoj)

Ni, Japana Popolo, agante pere de niaj dece elektitaj reprezentantoj en la Regna Parlamento decidis, ke ni garantiu al ni kaj niaj posteuloj la fruktojn de interakordo, kun ĉiuj popoloj kaj benojn de libereco en nia tuta lando, kaj ankaŭ ke ni aranĝu por ĉiam forigon de teruroj kaj mizeroj de milito denove okazigota de agoj de registaro, nun proklamas, ke la suvereneco apartenas al la popolo, kaj fondis ĉi tiun Konstitucion.

*

La Japana Popolo, kiu deziras eternan pacon kaj profunde konscias pri la altaj idealoj regantaj interhomajn rilatojn, decidis konservi siajn sekurecon kaj vivadon, fidante al la justeco kaj bona fido de la pacamantaj popoloj. Ni deziras okupi honoran lokon en la internacia societo, kiu klopcedas konservi pacon kaj por ĉiam forpeli el la mondo despotecon kaj sklavecon, subpremadon kaj malvastanimecon. Ni rekonas

kaj konstatas, ke ĉiuj popoloj havas la rajton egale liberigi sin de timo kaj malhavo kaj vivi en paco.

*

La Japana Popolo juras per la honoro de la Regno realigi kaj atingi ĉi tiujn altajn idealojn kaj celojn per sia tuta energio.

*

Artikolo 9. La Japana Popolo, sincere dezirante internacian pacon sur la bazo de justeco kaj ordo, forlasis por ĉiam, kiel rimedon por solvi internacian konflikton, militojn kiel ekfunkcion de regnopotencoj, kaj minacon per arma forto aŭ uzo de arma forto.

Por realigi ĉi tiun celon ni ne konservas landan, maran kaj aeran forton kaj ankaŭ aliajn militpovojn. Ni ne aprobas la rajton de militado de regno.

*

Artikolo 99. La Tenno aŭ la Regento, Regnaj Ministroj, la Regnaj Parlamentanoj, juĝistoj, kaj aliaj publikaj oficistoj prenu sur sin la devon respekti kaj gardi tiun ĉi Konstitucion.



Herboj reviviĝis, sed ne homoj.

Kio estas karakteriza en la post-milita radio-elsendo estas la speciala programo de “serĉantoj kaj serĉatoj”, kiun oni ankoraŭ aŭdas konstante eĉ hodiaŭ kiam sep jaroj pasis for post la milit-fino. Miloj kaj miloj espereble estas revenigotaj, sed multaj neniam.

Al la kategorio de ĉi lastaj apartenas la mortintoj sur Iŭojima — insulo plej malgranda, kie okazis milito plej furioza en historio. La 30-an de jan. de tiu ĉi jaro, kelkaj japanaj raportistoj estis permesitaj flugi al la insulo por surloka enketo. Samtage, ankaŭ kelkaj budaistoj alvenis por konsoli la spiritojn de l' ekstermitoj. La enmetita foto, supre, montras la tombejon starigitan por la memoro de la nekonataj soldatoj mortintaj. (La fotoj sur p. 46-47 estas afable pruntedonitaj de ASAHI-Jurnalejo, Osaka.)

Vin ne prenu for la mort'

Dediĉe al la frato
en la sieĝanta armeo ĉe Luŝunkoŭ

*Poemo de Yosano-Akiko
Esp-igita de T. Nakamura*

Ah, mia frato! Ploras mi en kor' pro vi;
vi volu nur, ke vin ne prenu for la mort'!
Vin la gepatra am' karesis tiom pli,
ĉar vin destinis je l' plej-juna fil' la sort'.
Sed ĉu la patro iam ajn devigis vin,
donante glavon, al hombuĉa fiprepar'?
Ke vi mortigu l' homojn, ankaŭ vin ĉe l' fin',
ĉu li edukis vin ĝis l' aĝo dudek kvar?

Ĉar kiel mastro de la komercista dom',
en Sakaj, fama pro malnov-devena glor'
vi estas heredant' de via patra nom',
vi volu nur, ke vin la mort' ne prenu for!
Ĉu l' citadel' Luŝunkoŭ venus al pere'
aŭ ne pereus eĉ post longa la sieĝ',
por ni ja kio? Ho, — ĉu vi ne scias ke
neni' rilatas al la familia leĝ'?

Ke vin la mort' ne prenu for, vi volu nur!
Ne iras al la batal' Mikado l' Granda mem;
neniam sin riskante en la aventur'
li, tamen, ke la homoj buĉe pro venĝem'
sangverŝu inter si laŭ brutaj manier',
kaj mortu, ĉar morto estas homa glor',
ho kial diktus en la fundo de l' sincer'?
Nenial, ĉar lia estas granda kor'!

Ah, mia frato, vi sur kampo de l' batal',
vi volu nur ke l' morto ne forprenu vin!
Lasita en aŭtuno de la lasta jar'
de l' patro per subita morto la patrin';
korŝire plie je l' fil' per militir'
prenita for ŝi devis en duobla plor
hejmzorgi sub "Regado Paca" laŭ
sed kreskis ŝia grizhararo pro lang

Kaŝeme sin malantaŭ la butik-kur
plorĝemas juna l' novelzin' gracia
ĉu ŝin sopiras vi aŭ ne per la mi
Memoru pri soleca l' kor' knabina se
foriris vi post dek-monata la uni'!
La mond' jam por ŝi sola estas sen komfort'.
Sur kiu tamen sin apogus ŝi krom vi?
Vi volu nur, ke vin ne prenu for la mort'!

Sino Akiko Josano (1879-1942)

Kune kun la edzo, *Tekkan Josano*, ŝi kontribuis al la evoluigo kaj disvastigo de l' propra novisma poezi-stilo eleganta, pompa kaj humane liberspira, kaj donis grandan sensacion al la poezia rondo de Japanujo en la epoko de Meiji (1868-1912).

Kiam la rus-japana milito eksplodis kaj la japana armeo komencis sieĝi Luŝunkoŭ (aŭ *Port Arthur*) en aŭg. de 1904, la juna frato de la poetino estis en la sieĝanta armeo. Elverŝante la amon kaj sopiron al li, ŝi versfaris la poemon, ĉi tie tradukitan. En ĝi ŝi klare montriĝas kiel aŭdaca mili(ne)anto — aŭdaca, ĉar ŝia esprimo estis "tro libera" en tiu tempo, kiam la japanoj vivis ankoraŭ en la malnov-sociaj konvencioj; tiom pli, ĉar ĝi estis — la virina voĉo.

Tiu ĉi poemo estis konata eble nur de poetoj antaŭe. Al la ĝenerala publiko ĝi tamen fariĝis subite populara post la fino de la Mondmilito II-a. En tiu fakto oni iugrade povus vidi la ideologian tendencon de la japana popolo en la moderna epoko.

La Tradukinto.

Film-Projekcia Rakonto

La Historio pri D-ro Zamenhof kaj Esp.

La *Oomoto-Junulara Ligo*, kiu preparis kaj eldonis ĉi tiun filmstrion, elĉerpis la materialon el pluraj fontoj. Sed ni kompilis la esp-an tekston, sendepende de la japana, al ni permesante ekstrakti la koncernajn frazojn iom modifante el la libro VIVO DE ZAMENHOF de Prof. Edmond Privat, 1920. (Krom pri Bildoj 1, 2, 25, 29, 30.) Pri tio ni ĉi tie petas afablan indulgon de la aŭtoro.

La Redakcio

1. La nomo de Esperanto estas vaste konata tra la mondo kiel la lingvo universala, jam uzata en plej diversaj sferoj ĉe hema agado. "La ellerno de Esp." iam diris Lev. N. Tolstoj, rusa verkisto, "kaj ĝia propagando estas sendube kristana agado, akcelanta la estigon de l' Regno Dia, — la agado, kiu prezentas la ĉefan kaj solan mision de homa vivo."

Karaj gesinjoroj! Ĉi tiu filmstrio prezentos al vi la historion pri la aŭtoro de Esp. kaj la historion de Esp.

2. Jen la unua krio de novnaskito aŭdiĝas en la familio de Zamenhof, en Bjalistok, malgranda urbo en Polujo. Tio estis antaŭ pli ol naŭdek jaroj, ekzakte la 15-an de decembro en la jaro 1859-a. Ĝi estis la naskiĝo de Lazaro Ludoviko.

3. La patro Markus Zamenhof estis pedagogo, naskita de hebreaj gepatroj, en Tikocin, ĉe landlimo inter pola kaj litva landoj, tiam regataj de rusa caro. Dudekjara junulo, li fondis lernejon en urbo najbara Bjalistok, kaj edziĝis al filino de hebrea komercisto tie, Rozalja Sofer. Inter ili naskiĝis Ludoviko. La

patro baldaŭ fariĝis instruisto de geografio kaj modernaj lingvoj ĉe mezaj ŝtatlernejoj.

4. Saĝa kaj severa estis la patro, viro skeptika je revoj, sed obstina je laboro. Religian kredon li havis nur unu solan, nome la plej fidelan akuratecon al devo ĉiutaga. La patrino havis dolĉan anĝelan naturon. "Plej certe ŝia kispuno pli efikas, ol la mano de l' patro", skribis unu el fratoj de Ludoviko multajn jarojn poste.

5. Ludoviko fariĝis lerneĵano. Inteligenta, modesta, pensema, studema, neniam laŭta, kvarkam obstina, li ĉiam evitis suferigi iun ajn. Ĉe klaso li jam aperigis kleron neordinaran kaj talenton por verkado. Instruistoj admiris lin. Amikoj nomis lin "barono", pro lia trankvila sintenado kaj ĝentilaj manieroj.

6. Knabo Ludoviko ja vidis la faktojn ĉirkaŭ si en stratoj Bjalistokaj. Tie loĝadis kvar gentoj malsamaj, kun lingvoj diversaj, kun kredoj malamikaj. De strato al strato ja regis malfido, suspekto, sur plaĉoj ofendo ĉiutaga, venĝemo, persekuto kaj malamo. Se pasis aro da

hebreaj kun la tipaj longaj barboj, al iliaj vizaĝoj jen celtrafas ŝtonaj kugloj en pafado... Plendas maljunulo. "Ne bleku, judaĉoj! hundoj!" krias knaboj el kristana gento kaj diskuras for.

7. Disputas vendistinoj kun germana marĉandulo. Alkuras homoj. Aliĝas videmuloj. Ĝendarmoj intervenas. Jen plendas virinoj en dialekto litva. Policistoj ne komprenas. "Ruse parolu!" minacas la oficiro, "nur ruse, ne lingvaĉe! Ĉi tie estas rusa lando!" Protestas Polo el amaso. Jam lin kaptas la ĝendarmoj. Inter tranĉaj bajonetoj li formarŝas, arestite.

8. "Kion scias tiuj homoj unuj pri l' aliaj?" sin afliktas juna Ludoviko, "ke ankaŭ ili havas koron, konas ĝojon kaj doloron, amas hejmon kun edzino kaj infanoj?" Eĉ penso tia ne okazas. Ekzistas nur Hebreoj, Rusoj, Poloj, Germanoj, sed ne homoj, sole gentoj." Kion fari, por ke homoj ne malamu unuj aliajn? "Se nur la homoj povus kompreniĝi!" li sopiris, kaj kalkuladis, kiun lingvon oni povus alpreni por tutmondo.

9. Kiam el reallernejo Bjalistoka li transiris al Varsovio, ĉefurbo pola, kun gepatroj, Ludoviko eniĝis gimnazion por klasikaj studoj. Kun fervoro li lernadis lingvojn grekan kaj latinan. Tre juna li ankaŭ lernis francan kaj germanan. Ĉe la kvina klaso li ekstudis anglan. Sed li baldaŭ ekrimarkis, ke la lingvo helpa de la homaro devas esti por ĉiuj facila. De tiam li komencis serĉadi iun novan per provaĵoj artaj. Pri multaj provoj kaj eksperimentoj, kiujn li faris por krei artan lingvon, ni ĉi tie ne mencias.

10. En la jaro 1878, Ludoviko Zamenhof sidis en la lasta klaso de la gimnazio. Tiam estis preta jam projekto de

lia lingvo, ankoraŭ ne tute simila al la nuna Esperanto. Kelkaj intimaj kolegoj interesiĝis je lia longa laborado. Fervore ses aŭ sep ellernis la sistemon. La 5-an de decembro, ili festis la vivigon de la lingvo. Post paroloj esperplenaj, ili en la nova lingvo kantis himnon de l' frateco:

Malamikete de las nacies
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

(Malamikeco de la nacioj
Falu, Falu, jam temp' estas!
La tuta homaro en familio
Kununuigi sin devas.)

11. En junio 1879 finiĝis gimnazia kurso, kaj ĉiuj kolegoj disiris. Kaj, kiel Zamenhof malĝaje konstatis poste, "renkontinte la mokojn de l' homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola". Tiel okazas preskaŭ senescepte ĉe la grandaj inspiritoj tra tuta homara historio. Hejme li devis suferi baton pli kruelan...

12. Unu el la profesoraj kolegoj de patro Markus Zamenhof admonis lin pri lia filo. "Ideo tiel fiksa en kapo junula minacas ja frenezon. Domaĝe estus lasi tian talentulon perdiĝi en ĥimeroj. Bladaŭ li malsaniĝos, se li daŭras plu!" Pri la estonteco de la knabo ĉefe zorgis lia patro. Kion li faros en la vivo, se ĉiuj rigardos lin kiel viron neseriozan, nur "revulon"? Kuracisto estis tiam unu el la solaj karioj permesitaj al Hebreoj en la Rusa Imperio. Tial Ludoviko devis eĉ promesi, ke li forlasos la aferon pri mondlingvo, almenaŭ provizore, ĉar utila studo, ne revojaĵoj, tiam urĝis antaŭ ĉio. Peza kaj dolora estis la ofero.

13. Post longa kiso de la prtrino la studento forveturis Moskvon, Mal-

riĉe loĝis la junulo. Per lecionoj li gajnetis iom. Sed malfacile juna hebreo trovas eĉ okazojn por instrui. Koscience li studadis medicinon. Ankaŭ li kliniĝis siavice super korpaj de mortintoj en ĉambrego dissekcia. Simpatie li malkovris la internan meĥanisman de la homa formo. Ĉu ne similaj estas ĉiuj homoj, kun samaj organoj, samaj bezonoj, samaj timoj kaj deziroj dum la vivo? Sed "por pensadi pri homaro, atendu kelkajn jarojn!" sonadis admono patra. Granda malpleno doloris en koro.

14. Du jarojn forpasis. Ludoviko ne ŝatis turdi elspezadon al gepatroj kaj revenis hejmen al Varsovio en somero 1881. Li trovis la manuskriptojn de la lingvo intergenta jam cindrigitaj de la patro. Li baldaŭ finis la universitaton. Ne tro grava estis la perdiĝo de l' skribaĵoj. Efektive li memoris ĉion parkere. Kun fervoro li refaris sian verkon. Inter 1885 kaj 1887 li vane serĉis tujan vivrimedon.

15. En 1836 li malfermis akceptejon kiel okulisto. Dum sama vintro li ekkonis sian fianĉinon Klara Zilbernik, filino de komercisto. Sprita, gaja, energia kaj bonkora, ŝi kuraĝigis la fianĉon eldoni sian verkon al publiko. Sed neniu volis riski monon por eldono. Tiam intervenis homo tre helpema. Li estis la patro de Klara. Simpla komercisto li estis, sed amanto je ideoj. Ja kio do utilis gajni monon kaj ŝpareti? Ĉu ne por igi vojon pli facila al unu pli klara ol li mem kaj pli valora por homaro?

16. La bopatro de la juna scienculo, proponis, ke la edziĝo jam fariĝu en somero, kaj antaŭe jam presiĝu je lia kosto la libretoj pri mondlingvo. Tiel okazis. Dum du monatoj presprovaĵoj atendadis ĉe la cenzuristo. La verko kredeble ŝajnis al li sendanĝera naivaĵo.

La "Unua Libro" aperis en la rusa lingvo.

17. Baldaŭ poste sekvis la eldonoj pola, franca, germana kaj angla. Ĉiu verko estis subskribita per belsona pseŭdonimo "Doktoro Esperanto", kiu nomo fariĝis poste la nomo de lia lingvo. La 9an de aŭgusto D-ro Zamenhof edziĝis. Kun edzino li komencis dissendadon de l' broŝuro al gazetoj kaj personoj ĉiulandaj. Kiel estos akceptita la libreto? Minacis dubo malespera. Unu post unu ekvenis respondoj. Demandoj, konsiloj, aproboj, aŭ fervoraj leteroj. Eĉ kelkaj estis jam skribitaj en la nova lingvo. Ĝi fariĝis do vivanta, ĉar uzata. Sed venis ankaŭ malfavoraj kritikoj.

18. Kvazaŭ por respondi tiajn malfavorajn kritikojn, li jam skribis en la Unua Libro kaj ankaŭ en la Dua Libro: "Ĉiu pene juĝu la aferon, proponitan de mi, kaj ĉiu montru al mi la erarojn, kiujn li trovis en ĝi, aŭ la plibonigojn, kiujn li povas proponi. Se la leganto ne povas ankoraŭ tute bone ekkoni mian aferon el mia unua libreto, tiu ĉi mia dua libro povigos lin post kelka tempo ekkoni ĝin tute kaj ĉiuflanke. Ke mia afero venu al dezirinda celo, estas necese ne sole, ke la mondo diru sian juĝon pri tiu ĉi afero, sed ke mi sciu la juĝon de l' mondo kaj povu ĝin uzi por mia laboro."

19. Aliflanke la maldolĉo de l' eksteraj cirkonstancoj returmentis la doktoron. Klientaro ne plenigis lian akceptejon. De l' bopatro li ricevis monon por presigi la broŝurojn. Sed por hejmo li ne volis akcepti lian helpon. Li deziris nepre perlabori vivrimedon.

20. Jam naskiĝis gefiletoj Adamo kaj Sofio. La edzino reveturis en loĝejon de l' gepatroj. Dume la juna okulisto denove serĉis praktikadon en alia loko. En Ĥerson, apud Nigra Maro, li klopodis

sensukcese. En marto de 1890 ambaŭ reunuiĝis en Varsovio.

21. Jam en 1889, la unuaj pioniroj en Nurnbergo eldonis la unuan revuon *La Esperantistoj*, kies eldonon poste Zamenhof devis ekpreni sur sin en tre malfavora cirkonstanco ekonomia. Kun edzino kaj infanoj li troviĝis en premanta malfacilo. En la dua n-ro de 1895, *La Esperantisto* publikigis la tradukaĵon el Tolstoja *Kredo kaj Prudento*. Pro tio, la rusa cenzuro malpermesis la gazeton en la Imperio. Terura bato: ĉar tie ĝi havis la plej multajn abonantojn. La elirado devis ĉesi.

22. Sed sur alia tero, feliĉe, grenero semita elkreskis. Jam en decembro de la sama jaro eliris *Lingvo Internacia*. Upsala Klubo Esperanta eldonis la gazeton en Svedujo. De post tiam la movado ne haltis iam plu. Baraktante kun akraĵoj de l' vivado Zamenhof dediĉis sin al esperantigo de diversaj mond-literaturaĵoj.

23. De 1900 al 1905 Esperanto progresadis pli rapide. En dek du landoj ekfondiĝis grupoj kaj gazetoj. En Francujo gravaj societoj ĝin subtenis. Aliĝis jam konataj scienculoj. La movado iĝis vasta. Tiam estis kunvokita en Bulonj-sur-Marco la Unua Kongreso de l' Esperantistoj. Kun edzino Zamenhof vojaĝis. Ĉirkaŭ la teatro kunveneja jam aŭdiĝis nur la lingvo internacia. Ĉiuj sin facile komprenis. Flue flugis la paroloj. De lipoj al oreloj. De Svedoj al Italoj. Falis muroj inter la popoloj. Ĉiu sciis ja parkere liajn versojn kuraĝigajn:

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras,
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.

Ankaŭ sonis la muziko de l' himno *La*

Espero:

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko...

24. La Dua Kongreso de l' Esperantistoj okazis en Ĝenevo, la Tria en Kembriĝo, la Kvara en Dresdeno, la Kvinna en Barcelono, la Sesa en Vaŝingtono, la Sepa en Antverpeno, la Oka en Krakovo. Intertempe oni ĉiam nomis lin "Majstro". Sed li ne ŝatis la titolon. Ne majstro, sed homfrato kaj kolego li volis esti. En la Krakova Kongreso, li interalie deklaris: "... Kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba... mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi "majstron", ke vi ĉesu honori min per tiu titolo."

25. Modesta li ĉiam vivis. Sed ne estus facile por Esperantistoj plenumi lian deziron, ĉar ĉiuj estis kutimigitaj vidi en li ne nur la ĉefon de la esp-a movado, sed ĉiam sentis por li ankaŭ profundan, koran simpatie por liaj noblaj ideoj, por la multjaraj oferoj, kiujn li alportis al tiuj ideoj, kaj ankaŭ ĝuste pro tiu modesteco, kiu karakterizis ĉiujn liajn agojn. Ne estas do mirinde, ke H. Fischer, rumana samideano, ekstaris kaj proponis: "Ĉar ni estas plenjaraj, ni do povas malobei patron kaj daŭrige nomi lin — patro". La kunsento de ĉiuj ĉeestantoj esprimiĝis en longaj, laŭtaj aplaŭdoj. Ankaŭ ni hodiaŭ daŭre nomas lin "Patro" aŭ "Kara Majstro."

26. En la Naŭa Kongreso, kiu okazis en Berno, 1913, Zamenhof jam ne parolis sur estrado, kiel li promesis la antaŭan jaron. Ame ĉirkaŭata, li sidadis en la mezo de la kongresanoj kun edzino. Saman jaron li publikigis novan eldonon

de l' broŝuro "Homaranismo". Ĝi estas tute difinita politika-religia programo, kiu prezentas lian kredon. Por li la lingvo Esp. estis nur *rimedo*: lia vivcelo estis fondi neŭtrale-homan religion sur la bazo de **Homaranismo**.

27. En 1914 la unua mondmilito eksplodis. En Varsovio la vivado fariĝis abomena. Rusaj armeoj plenigis la urbon. Gazetisto atakis eĉ Zamenhof "danĝeran internaciulon". En 1915 malsana, malforta, kun animo disŝirita pro la malamo inter homoj, li laboris super projekto de alvoko al Kongreso Homarana. Sed antaŭe estus ja necese kunvoki pli malgrandan kunvenon preparan. Li pretigis cirkuleron, anoncante ke la kunveno "okazos en la lastaj tagoj de dec. 1916" en urbo svisa. Sed la milito daŭris. Sur la manuskripto tiu dato kuŝas trastrekita. Li skribis ŝanĝe: "en la unuaj tagoj de aŭg. 1917". En marto, la milito daŭris ĉiam. Ĉu senfine? Denove korektaĵo montras krajone, kaj eĉ tragike, ĉi tiujn vortojn per tremanta

mano: "post la fino de la milito".

28. La milito ne finis. Ĉiu spiro lia fariĝis turmento.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele, Sed ĝi sin dividis batale; Popolo popolon atakas kruele, Frat' fraton atakas ŝakale.

La 14-an de aprilo, 1917, kun la edzino apud li, ĉesis bati tiu koro, batinta tiel forte por homaro. Sur lia skribotablo kuŝis lasta manuskripto krajona, nefinita. Ĝi estis plano de artikolo pri senmorteco de l' animo. Kion kredis mem tiu granda amiko de l' homaro, kiu donis tutan vivon al pensoj unuigaj? Sur papero kvarpaĝa li komencas per la jenaj vortoj:

"Ĉio, kion mi nun skribas, naskiĝis en mia kapo ne nun, sed antaŭ kvardek jaroj, kiam mi havis la aĝon de 16-18 jaroj: malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis diversajn sincerajn kaj filozofiajn verkojn, miaj tiamaĵaj pensoj pri Dio kaj senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis."

"Mi eksentis, ke eble morto ne estas

Rhein, Germanujo

34. D-ro Anakreon A. Stamatidis (Prez. de "Supera Helena Esp. Instituto kaj Helena Esp. Asocio"), Ateno, Grek-
ujo

35. S-ro Oskar Sinner, Wien, Aŭstrujo

36. S-ro O. N. Ihrborn, Klegerup, Svedujo

37. S-ro Erik Belle, Lierfoss, Norvegujo

38. S-ro Carl Barthel, Frankfurt a. M., Grekujo

39. S-ro Josef Maryska, posta Mochov u Prah. Ĉeĥoslovakujo

40. S-ro Joanis P. Kaloumenos, Athinai, Germanujo

(Pardonon! Pro manko de fremdaj supersignitaj preslitteroj ĉe la presejo, ni ofte ignoris la supersignojn.)

LA REDAKCIO

Gratuliatoj por la Jubileo

(Daŭrigo)

22. S-ro H. Jokinen, Kalanti, Finnlando

23. S-ro A. Omlor, St. Ingbert, Saarlando

24. S-ro F. R. Jones, Bebington, Anglujo

25. F-ino Z. Auden, Liverpool, Anglujo

26. F-ino Kathleen Hard, Liverpool, Anglujo

27. S-ro Lorenzo Til, Zaragoza, Hispanujo

28. S-ro A. Cimino, Firenze, Italujo

29. S-ro Gunnar Rugland, Naeka, Svedujo

30. S-ro Ruzicka Vaclav, Decin, Ĉeĥoslovakujo

31. S-ro Franz Watzinger, Villach, Aŭstrujo

32. S-ro Erkki Mansikka, Vaasa, Finnlando

33. S-ro Alfons Schreier, Ludwigshafen/

malapero...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo...; ke io min gardas al alta celo..."

Tiuj estas lastaj vortoj de l' skribaĵo.

29. La vivo de D-ro Zamenhof ne estis por religio, sed por lingvo. Kreinte Esp-n li donis rimedon praktikan por ebligi amon. Esp. vivas jam de 65 jaroj. Kiel la elprovita kaj plej taŭga interkomprenilo de la homaro, ĝi baldaŭ fariĝos la "oficiala" lingvo, ne laŭ la sankcio de unuopaj registaroj, sed laŭ paŝoj plej demokrataj — per nia komuna uzado.

Tia tendenco estas ne nur videbla, sed jam potenca. En 1950 la speciala delegitaro de la Esp-movado submetis la Petskribon subskribitan de pli ol 16-milionoj da personoj al UNO, por ke ĝi plenumu enketon por akceli la komunan uzon de Esp. La Sekretariejo de UNO, kiu akceptis la Petskribon favore, transdonis ĝin al UNESKO.

Dume. Esp. estis aktuale parolata kune kun la angla, franca kaj germana ĉe la Konstituta Kunveno de la Popoloj (Interpopola Mondparlamento) kiu okazis en Ĝenevo inter 30 dec. 1950 kaj 4 jan. 1951.

30. Karaj gesinjoroj! Kiel vi vidis, Esp. kaj ĝia propagando estas la grava sociala problemo por krei la mondon idealan sur neŭtrala lingva fundamento. Via aliĝo al nia tendaro estas urĝa afero. LA FINO

La Historio pri

Dro Zamenhof kaj Esp

Projekcia Filmo

Kun 30 bildoj (35mm)

Kompilita kaj eldonita

de
Oomoto-Junulara Ligo



Prezo: ¥400 por enlando afrankite

\$1.5 por eksterlando afrankite

Mendebla ĉe

La Redakcio de OOMOTO

Bildoj 1, 10, 21, 26, 29.



Parolas la Legantaro

Ĉu la milito en Koreujo finiĝos en 1954?

Alfons Schreier
Ludwigshafen/Rh. Germanujo

Mi volas diri al vi, ke min plaĉis en via n-ro 136 precipe via artikolo "Al Sekurec-Garantio de Dio". Vi mencias en ĝi interesajn nombrajn faktojn. Antaŭ kelkaj tagoj mi trovis en ĉiutaga ĵurnalo de mia urbo artikolon pri simila temo: "Ĉu la milito en Koreujo finiĝos en la jaro 1954?"

Resumite la enhavo de la artikolo: La milito inter Germanujo kaj Francujo (1870-1871) komenciĝis en la jaro 1870. Adiciu 1, t.e. 1871. Nun prenu la du unuajn ciferojn: 18 kaj adiciu ilin: $1 + 8 = 9$. Kaj prenu la du sekvantajn ciferojn kaj adiciu ankaŭ ilin: $7 + 1 = 8$. Nun konstata la diferencon 9 kaj 8: estas 1. La daŭro de la milito estas 1 jaro. Tre simpla afero, ĉu ne?

Por konstati la fintagon de la milito prenu la nombron de la komencjaro (1870) kaj de la sekvonta (1871) kaj adiciu ilin: $1870 + 1871 = 3741$. Nun denove prenu la unuajn ciferojn: $3 + 7 = 10$, estu la tago de la militfino. La aliaj ciferoj adiciitaj: $4 + 1 = 5$, estas la monato = majo (laŭ la eŭropa kalendaro). Fakte la milito finiĝis en la 10-a de majo, 1871 (kontrakto de Frankfurt/Main).

Nun pri la 1-a mondmilito en Eŭropo (1914-1918):

Militdaŭro: $1914 + 1 = 1915$, $1 + 9 = 10$, $1 + 5 = 6$, $10 - 6 = 4$ (jaro). Fintago: $1914 + 1915 = 3829$, $3 + 8 = 11$ (tago). la monato: $2 + 9 = 11$. Fakte la armistico de la 11-a de novembro 1918 finigis la militon.

La 2-a mondmilito (1939-1945):

Militdaŭro: $1939 + 1 = 1940$, $1 + 9 = 10$, $4 + 0 = 4$, $10 - 4 = 6$ (jaroj) $1939 + 6 = 1945$ (jaro de la militfino). Fintago: $1939 + 1940 = 3879$, $3 + 8 = 11$. la monato: $7 + 9 = 16$ (16 ne signifas monaton, tial mi adicias plue), $1 + 6 = 7$. militfino estas do 11. 7. 1945. Tiu kalkulo ne pravas, ĉar ĝi estis fakte 11. 5. 1945. Sed la eraro ne estas tro granda. La diferenco estas nur 8 semajnoj rilate al 72 monatoj.

Koncerne la militon en Koreujo ĉi tiu kalkulmetodo ne kaŭzas optimismon. Laŭ la kalkulo la fino de la milito estus en la 12-a de marto 1954. Espereble la kalkulo ne estos ĝusta!

★ S-ro C. Nelson, Dordrecht, Nederlando

Ĉiam mi legas kun intereso vian monatan organon OOMOTO, kiun vi afable sendas al mi. La enhavo estas ofte tre interesa. Precipe min interesis la diservo universala por la viktimoj de la 2a mondmilito.

Pere de nia kara lingvo Esperanto, kiun mi nun jam pli ol tridek jarojn propagandas, estas eble al ni rekte sciigi pri okazintaĵoj en malproksimaj landoj kiaj la via.

★ S-ro C. Daglio, Tortona, Italujo

Kore mi aprobas la artikolon de s-ro G. Dronchat (Parizo) pri Picasso kaj Matisse. Kun intereso mi bone informiĝis legante la artikolon "Pri Japana Kino-Industrio". Ankaŭ valora estas la artikolo de Teruo Mikami (ĉu mi bone legis?) pri El Notlibro Esperantista.

Rondeziro al Oomoto Jubilea

Ruzicka Vaclav,
Decin, Ĉeĥoslovakujo



Iomete malfruiginte, sed des pli sincere, ankaŭ mi rapidas por aldoni kelkajn elkorajn gratulvortojn al tiom grava okazintaĵo kiel la 60-jara datreveno de la de ni ĉiuj plej amata homama Oomoto movado.

Kiom da ĝojo, animfeliĉo kaj trankvilo alportis al mi persone kaj certe al ĉiuj seriozaj interesuloj tutmondaj ĝuste la viaj vere modele ekipitaj redaktitaj Oomoto-kajeroi. Dum niaj ĉiusemajnaj klubaj kunvenoj mi kelkfoje sukcesis utiligi kelkajn artikolojn por informi la klubanaron pri la misio de la Oomoto movado. Kaj ĉiam ĝoje mi vidas la atentplenajn vizaĝojn de niaj

geklubanoj, kiuj neniam aŭdis tiom da bonkoraj vortoj, kiujn mi transdonas al ili el la verkaĵoj de nia Majstro Onisabro Deguĉi.

Vere multon helpis al mi la regule sendataj ekzempleroj de l' gazeto Oomoto, dank' al kiuj mi sukcese povas semadi amon en la korojn de miaj samklubanoj. Ĝojo sincera plenigas pro tio ankaŭ mian koron, ĉar mi konscias mian porhomaran agadon. Kaj tion mi povas fari nur helpe de vi, miaj karaj fratoj kaj samkreduloj.

Ĝuste hodiaŭ, skribante ĉi liniojn, estas la sankta vespero, tiu vespero, dum kiu ĉiuj diversreligiaj en la tuta mondo rememoras la naskiĝon de Jesuo Kristo, naskiĝon de la unua homo, kiu akcelis kaj oferis sian vivon al predikado pri la Amo de homo al homo. Estinte miskomprenita de siaj samtempuloj Li devis morti. Kiel multe similas nia neforgesebla Mojstro O. Deguĉi al Jesuo Kristo nun tutmonde rememorata kaj de ni ĉiuj adorata. Ankaŭ Li ja venis por konigi la veran, senfalsan amon al ni, Liaj disĉiploj, kaj adorantoj de Liaj agoj. Ankaŭ O. Deguĉi devis, same kiel Jesuo, suferi pro sia grandega AMO al la baraktanta kaj suferanta homaro. Ne kompreneble de la plej granda parto

de la homaro, same kiel Jesuo, ankaŭ Li tamen venos en la korojn de sincere al Li kredantaj homoj. La evoluo de la homaro al Bono iras ja senhalte kaj venkplene antaŭen kaj neniu potenco kapablas ĝin haltigi aŭ flankigi. Kaj ni ĉiuj Oomotanoj, celantaj vidi en ĉiu homo, laŭ ekzemplo de nia Majstro, sian fraton; ni ĉiuj bone scias, ke nia Majstro, same kiel Jesuo venis inter nin ordinariajn homojn, komisiita de la eksterordinara misio de la Granda kaj Eterna Dio. Kaj mi sincere dezirus, ke oni ĉi-vespere en la tuta mondo rememoru samtempe ambaŭ Grandanimulojn, kiuj havis ja la saman celon: Doni la AMON kaj siajn KOROJN al la suferanta homaro por savi ĝin.

Ĉe la fino de mia modesta rememoro okaze de la Sankta vespero kaj okaze de la 60-jara datreveno de Oomoto movado, mi sincere dezirus al ĝi, ke ĝi estonte progresu, disvastiĝu kaj ke ĝiaj pensoj eniru en la korojn de la tuta homaro.

Nur tiam venos la sopirata de ni ĉiuj MONDPACO.

Kun la plej sinceraj salutoj mi restas via fidela admiranto, propagandisto kaj samcelano,

Arto kaj Religio

Ekstraktita el ESPERANTO
EN SKOTLANDO, N-ro 15

“Estu poetoj! Inter poetoj troviĝas neniu malbonulo. Miaj apostoloj, vi ĉiuj (ernu la vers-faradon de tanka-poemetoj.” Rimarkante, en la kajero n-ro 130 de “COMOTO,” tiujn vortojn de O. Deguĉi, adoptita filo de la fondinto de tiu religio fondita en Japanujo, kies oficiala lingvo por eksterlando estas Esperanto, mi tuj ekpensis: “Ej-la! jen estis homo sufiĉe klarvida!” Nu, mi mem estas poeto.

En alia artikolo mi trovis alineon, kiu konvinkis min, ke la Oomoto-afero estas sagace kaj klarvide elpensita: Estas tri malsamaj pordoj, tra kiuj oni povas atingi Dion: 1. La pordo de bono kaj amo (religio, aŭ etiko); 2. La pordo de vero kaj logiko (scienco, aŭ filozofio); 3. La pordo de belo (arto).” Do almenaŭ unu pordo al Dio estas malfermita al ĉiuj homoj de bona volo kaj sincera vivmaniero.

Sed mi ne celas propagandi ĉi tie la religion Oomoto, de kiu mi cetere ne estas ano; mi volas nur menciĝi tiun kajeron n-ro 130 de la organo. Ĝi estas dediĉita al la temo, kiu titolas mian artikolon, kaj enhavas bildojn (inkl. reproduktajn de japanaj pentraĵoj), poemojn kaj interesajn artikolojn. Ĉiu esperantisto, kiu ĝuas japanajn artaĵojn (kaj kiu ne estas sorĉita de la ĉarme penikitaj pentraĵoj de la orienta kulturo?), certe volonte posedus tiun ĉi kajeron. Oni sendube liveros ĝin kontraŭ peto al la adreso: OOMOTO, Kameoka, KIOTO

Ankaŭ al fakulo la poemetoj en tiu kajero estas interesaj. Kvankam en japana lingvo la tanka ordinare estas senrima, la formo tre firme radikigiĝis en Esperanto, pere de okcidentaj poetoj, kun po unu rimo, en la dua kaj kvina versoj (vidu ekz-e tiujn de A. D. Foote

en Esp. en Skot. n-ro 13). Estas do interese rimarki, ke la japanaj verkistoj en Oomoto ordinare donas al la tanka po du rimoj, ekz-e:

Ho, estu Paco
nun konstruita brile
jam kun aŭdaco
sur bazo senperforta;
alie, ne stabile!

Mia nescio pri la japana lingvo estas profunda, kaj tial mi ne rajtas fari decidojn pri la tradukado de japanaj tankoj (pri kiu cetere tiu numero de ‘Oomoto’ enhavas interesan artikolon); tamen mi konfesas, ke la “okcidenta” tanka ankoraŭ ŝajnas al mi pli perfekta formo por Esperanto. Eble pro tio, ke mi kutimiĝis al ĝi: tamen kaj rimomanko kaj rimabundo impresas min nekontentige.

W. A.

*
Ekstraktita el BOLETIN, N-ro 10

Antaŭ ne longe atingis nin eksterordinara numero de ĉi tiu gazeto, speciale dediĉita al Arto kaj Religio. Estas vera pluzuro legi ĝin, eĉ se oni ne konsentas kun la ideo de Onisabro Deguĉi, fondinto de la Oomoto-movado. La numero, kiun mi recenzas, montras sur tre bonkvalita papero mirinde belajn fotografaĵojn pri artaj kreitaĵoj de O. Deguĉi, inter kiuj troviĝas ĉarmaj diverskoloraj tetasoj. Ne malpli belaj estas la konceptoj esprimitaj en la artikoloj, instruantaj al ni, ke Arto kaj Religio estas nedisigeblaj. Jen frazo de O. Deguĉi pri tio: Arto estas la patrino de Religio.

Alia interesa rubriko de nia orienta kolego estas tiu sub titolo “El Notlibro Esperantista” majstre zorgita de Teruo Mikami, kiu per subtila bonhumoro, tipe japana, prezentas al la esperantistaro instruajn legindaĵojn. Resume, OOMOTO estas elmonro de la milda delikateco de la japana spirito, kaj ĝi detruos multajn antaŭjuĝojn ekzistantajn en Eŭropo pri tiu progresema popolo. J. Juan Forné

Alvoko de U. E. A.

La 1-an de Januaro 1952 ekfunkciis en Londono nova grava institucio de nia movado: la Centro de Esploroj kaj Dokumentado de U. E. A. La celo de la Centro estas triobla: sciencaj esploroj, dokumentado kaj informado. Pere de siaj kunlaborantoj la Centro esploras kaj studos la Internacian Lingvon kaj ĝiajn multflankajn aplikojn sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco el vidpunktoj lingvistika, sociologia kaj psikologia. Apartan atenton ĝi dediĉos al la studado de la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Ĝi ankaŭ esploras la eblecojn por plua utiligo de Esperanto sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco k. t. p.

La branĉo Dokumentado rilatas al kolektado kaj enregistigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn.

La rezultoj de tiu scienca-esplora kaj dokumentada laboro estos vaste utiligitaj por verkado de artikoloj, kunmetado de prelegoj por diversaj okazoj, pretigado de skizoj por flugfolioj, alvokoj, broŝuroj, liverado de taŭga kaj dokumentita materialo por defendi la aferon de la Internacia Lingvo en kongresoj, konferencoj kaj en aliaj medioj, kiuj pritraktas la demandon de komuna lingvo.

La C. E. D. interŝanĝados dokumentojn kun UNO, UNESKO kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj. Ĝi precipe intervenados en la internaciaj medioj, sed ĝi estos je dispono de nia tuta movado, de ĉiuj ĝiaj organizaĵoj, kiam ajn ili deziros

argumenti kaj dokumenti sian aktiv-econ por Esperanto en diversaj medioj.

La Komitato de U. E. A. komisiis la direktadon de la C. E. D. al Prof. Dr. Ivo Lapenna, kiu plenumos tiun taskon honorofice. La Centro havas kunlaborantojn en diversaj landoj. Ankaŭ la kunlaborantoj plenumas sian laboron honorofice.

La financajn rimedojn por ekfunkciigo de tiu ĉi gravega institucio de nia movado havigis parte U. E. A. kaj parte kelkaj oferemaj esperantistoj kaj agemaj Esperanto-grupoj. La aliaj esperantistoj aŭ grupoj, kiuj deziras finance subteni la Centron kaj tiamaniere ebligi al ĝi kiel eble plej efikan realigon de ĝiaj celoj, estas petataj sendi siajn kontribu-aĵojn aŭ al la Centra Oficejo de U. E. A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, nepre menciante, ke la sendita financa helpo estas por la C. E. D. Fine de la laborjaro, en Junio 1952, la nomoj de ĉiuj donancintoj estos publikigitaj en la oficiala organo de U. E. A.

En ĉiuj aferoj rilate al la Centro oni sin turnu rekte al Prof. Dr. Ivo Lapenna, 300 West End Lane, London, N. W. 6.

Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitanças jene:

11. S-ro Jussi Sive, Karvia, Finnlando: semoj de 6-specaj fojnoj
12. S-ino R. M. Dhonau, Sheringham, Anglujo: semoj de 10-specaj legomoj

Literatura Kritiko

ANTAŬ DU MIL JAROJ... Romano de Emmanuel, mediumita de Francisco Cândido Xavier per la portugala lingvo, esp-igita de L. C. Port Carreiro Neto; eldono de Brazila Spiritista Federacio, Rio de Janeiro, Brazilo, 1951, 12.5 x 18.5 cm., 400 p.

Jen estas kortuŝa romano temanta pri la tragedioj de la homo, kiujn kaŭzas lia spirita malklereco; unu el la maloftaj verkoj, kies aperon ni dankas al la spirita komunikobleco inter nia mondo kaj la Transmondo. La aŭtoro estas la Spirito nomata Emmanuel, kies reĝnarkniĝo antaŭ du mil jaroj vivis sur la tero kiel la fiera patricio deveninta de malnova familio el senatanoj kaj konsuloj de la Roma Respubliko. Alta laŭ la socia hierarkio, li tamen estis "malica homo portanta riproĉindajn malvirtojn, kiujn bedaŭrinde posedas la plej granda parto de la Homaro." Kiel jam la progresinta "Supera Spirito" li nun konfesas: Estis necese, ke la jarcentoj forpasu, por ke ni lernu (en la Spirita Mondo) la unuajn elementojn de via (dirante al Sinjoro!) scienco, tiu scienco de pardono kaj de amo! Ĉi tiu 400-paĝa libro do estas la biografio de "tiu, kiu kiel viro, vivis alkroĉita al la Ŝtataj aferoj, kiuj deflankigis lin de la plej ĉarmaj plezuroj de la hejma vivo; kiel edzo, ne havis energion sufiĉan, por sin gardi kontraŭ la insidaj kalumnioj; kaj, kiel patro, rigardis sin kiel la plej malfeliĉa el ĉiuj."

Disvolvante ĉirkaŭ si la reton de homaj okazaĵoj kaj historiaj faktoj kun la fono de Romo kaj Jerusalemo en kaj tuj post la tagoj de Jesuo, li plej kor-

tuŝe rakontas, interlinie instruante al ni la leĝojn pri Dia amo, pri la multoblaj ekzistoj de la homa vivo kaj pri la determinismo kiu *ilin* ligas kaj regas (la komplika meĥanismo de la Dia Juĝopovo!)

La ĉi-suba skizeto el la romano parte prezentos al niaj legantoj la enhavon de tiu ĉi libro klariganta pri tiu meĥanismo, kiu nevideble teksas nian vivon per la leĝo de "kaŭzoj kaj rezultoj" laŭ la orient-filozofia esprimo.

*

La senatano Publio Lentulus Cornelius kaj lia edzino Livia havas gefilojn. Flavia estas la filino, Marko la filo. Flavia estas malsana; ŝi suferas de lepro. Por resanigi ŝin, la tuta familio de Publio vojaĝas al Palestino kaj de tie al Jerusalemo. Survoje juna judo, Saul, enĵetiĝas en la palenkenon de la senatano. Ĉi tiu, ofendita kaj flamiĝinta de kolero, ordonas la maldeculon en karceron. Andreo, la patro de Saul, patre petegas al la senatano por la indulgo kaj savo de la filo. Lia peto tamen ne estas plenumita.

Dum oni ne rimarkis, Saul malaperas el la karceron. Publio kredas, ke li ŝtelo forkuris. Sed la fakto estas ke li estis forvendita kiel sklavo. En tiu antikva tempo, malhonestaj ŝtatoficistoj vendadis junajn arestitojn al ambiciaj sklavo-komercistoj — kiel ĉevalojn. Saul estis aĉetita de Flaminio, la intima amiko de Publio, en Romo.

Aliflanke, Marko, la filo de Publio, malaperas forrabita de iu, dum Flavia resaniĝas dank' al la kareso de Jesuo el Nazaret.

Flaminio en Romo havas du filojn: Agripo kaj Plinio. Plinio kaj Flavia geedziĝas. Tiam okazas amkonfliktoj, ĉar ŝin amas ankaŭ Agripo. Ne nur Agripo, sed ankaŭ Saul — jam emancipita kaj nun riĉa...

Forpasas multaj jaroj. Kiam la Romaj armeoj sieĝis Jerusalemon, Publio falas en la manojn de la malamikoj kaj estas kondukita antaŭ Juda Ĉefo. Ĉi tiu demandas, "Ĉu vi rekonas min?" En li Publio rekonas Andreon, la patro de Saul, kies peton li iam rifuzis. Andreo venigas junulon kaj ordonas, ke li bruligu la pupilojn de Publio kiel venĝopuno. La junulo treege hezitas, sed sub la minaco de Andreo, li per blankarda fero blindigas Publion. Kiel blindulo, Publio tro malfrue ekscias, ke la junulo estas lia longe perdita filo, iam forrabita de la venĝema Andreo.

*

Nu, kiam Saul falis en la ardan pasiĝon por Flavia, li pensas, ke nur "se ŝi amos lin, reciprokos la fortan pasion de lia flama, egoista spirito, li jam neniam pensos pri sia planata venĝo kontraŭ la koro de ŝia patro (Publio)" kaj "li rekondukos la junulon Marko en lian patran hejmon kaj elviŝos sian pasintecon plenan de krimaj intencoj, sed, se okazos kontraŭe, li realigos siajn malicajn projektojn, ĝis ebrieco drinkante la malamaman vinon de la venĝo."

Kaj li iras por peti helpon de la mistera scienco de Arakso, fama Egipta sorĉisto. Ĉi tiu admonas lin (kvankam Saul poste subaĉetas lin por komploto):

"Judo! laŭdu la dion de viaj kredoj, ĉar vian vizaĝon levis el la polvo manoj de la viro, kiun vi hodiaŭ penas perŝi... eĉ en penso, vi ne deziru la edzinon de via proksimulo kaj des malpli la sindonan, fidelan edzinon de

unu el viaj plej grandaj bonfarintoj... Estis tempo, kiam via sprito vivis en la korpo de pastro de Apolono, dum la glora epoko de Delfoj... Vi persekutis junan gardistinon de la sanktaj misteroj kaj ŝin kondukis al mizero kaj morto per viaj abomenaj, doloraj malsaĝaĵoj. Ne kuraĝu nun tiri ŝin el la brakoj, destinitaj por helpo kaj protekto al ŝi en ĉi tiu mondo! Ne enstrudiĝu en la destinton de du homoj, kiujn la ĉielaj fortoj konformigis unu al la alia!"

Publio ofte "rememoris siajn iamajn sonĝojn, dum kiuj, vidante sin kiel Publio Lentulus Sura (la patro de lia avo), en vestoj de konsulo en la epoko de Kati-lina, li blindigis per blankarda fero siajn opoziciantojn." Kaj ĉe la fina parto de lia vivo, li konvinkiĝas kiel jene:

"Hodiaŭ mi kredas, per la propra sperto, kiun la suferigaj laboroj en la mondo havigis al mi, ke ni mem kunhelpas por pliseverigi aŭ dolĉigi la krudecon de la spirita situacio ĉe la taskoj de ĉi tiu vivo. Konsentante nun la ekziston de iu Ĉiopova Dio, fonto de la tuta favorkoreco kaj de la tuta amo, mi kredas, ke Lia leĝo de solidareco kaj la amo devas regi ĉiujn estaĵojn, kaj, laŭ ĝiaj artikoloj, la feliĉo estas la determinismo de la ĉielo por ĉiuj animoj. Ĉiufoje, kiam ni falas sur la vojon favorante aŭ praktikante la malbonon, ni, per nia relativa libereco, nekonvene intervenas en la Leĝo de Dio, kaj faras do novan ŝuldon, kiun ni pagas elportante la pezon de la ĉagrenoj."

Rememorante sian sonĝon, supre menciitan, li pentas, dirante:

"La kulpelaĉetoj ne estas necesaj en la mondo, por la rafinado de la animo, se ni komprenus la bonon, farante ĝin per agoj, paroloj kaj pensoj. Konsentante, ke mi vere naskiĝis kondamnita al

blindeco, en tia tragika maniero, mi tamen eble evitus tiun provon, se mi forlasus mian fieron, por esti humila, bona homo.

“Elmontraĵo de grandanimeco de mi aliiĝus la humoron de Andreo de Ĝioras kontraŭ mi; sed vere, malgraŭ ĉiuj ne-takseblaj admonoj de la Superaj Regionoj, mi tenadis plu mian egoismon, mian vantamon kaj mian kriman senpentecon. Mi do pligrandigis miajn abomenajn ŝuldojn ĉe la Dia Juĝopovo, kaj ne povas espe i indulgon de la min atendantaj juĝistoj...”

LINGVAĴO. Traduko bonega. Nur la stilo iom tro plena de elegantaj retorikaĵoj. Ĉu tio estas atribuebla al la nesufiĉa adaptiĝo de l' spirita aŭtoro Emmanuel al la moderna lingvo, malgraŭ ke li konfesas, ke “jam de la komenco li klopodis, por konformigi tiun antikvan historion al la gusto de la esprimoj de la hodiaŭa mondo”? Preserarojn mi trovis nur kelkajn krom la jam “korektitaj”. p. 59, Ĉiupova (Ĉiopova). p. 215 jetis (jetis). p. 384 iniciitoj (iniciitoj).

Erara estas la uzo de la vorto “intima” kun la senco: interna aŭ sekreta, kiel “intima kolero”, “intimaj meditoj”, “intima decido”, “intime li nutris doloran dubon pri la konduto de Livia” ktp. P. 65, Ŝi lasis la ŝenatanon konfuza kaj afekcivita”; konfuzita estus preferinda. P. 71, densa karavano; la adjektivo ne estas ĝusta. P. 96, li surde aldonis; en la senco “mallalte” la adverbo ne estas ĝusta, ĉar surduloj laŭtege parolas ĝenerale. Kiaj voĉoj estas “kaveca voĉo” (p. 347), kaverna voĉo (p. 234) kaj kava tono (p. 183)? p. 186, la fina *detalo* de la terura dramo (?) Sur p. 235 kaj 242, anst. la formo “ne nur... kiel ankaŭ...” estu “ne nur..., sed ankaŭ...” p. 294, Kiam

nur malmultaj minutoj *mankis* por...; restis. p. 331, por ke mi *havus* ian dubon pri ili; la verbo estu en u-modo post *por ke*. p. 333, la *edzina* ĉambro; la posesiva uzo de adjektiva finiĝo (en multaj aliaj paĝoj) ne estas rekomendinda. p. 363 kaj aliloke, torakso; ĉu ne *torako* estas pli komuna?

Jam estas superflue aldoni, ke en nenies biblioteko esp-a devas manki ĉi tiu “klasika” valorajo. *Dan Rak.*

INVITO AL ĈIELO, originala romano de James D. Sayers, eldono de Siegfried Ziegler (Esp-Fako), Munchen-Pasing, Germanujo, 1949, 12 x 18.5 cm., 205 p.

Du amikoj, sciencisto kaj ĵurnalisto, sukcesas “forfaligi” sin de la Tero kaj atingas la mondon de Marso. Apenaŭ ili revenas sur la Terglobon, policistoj enkarcerigas ilin. Oni kondamnas ilin al morto sub akuzo, ke ili estas “renversigaj” elementoj de la socia ordo. En la karceroj, la ĵurnalisto, pro profesia kaj humana devo, ekspluatas siajn lastajn horojn por finverki la raporton pri ĉio, kion ili travivis en Marso, la mondo de Pli Aĝaj Geŝatoj de la homaro. La tuta rakonto do konsistas en la raporto de tiu ĉi ĵurnalisto en la formo de romano. La enhavo kredeble ŝajnos al multaj pure fantazia, sed al tiuj, kiuj kredas la ekziston de la Spirita Mondo, estas evidente, ke la aŭtoro muntis la romanon el materialoj donitaj de spiritismo, eĉ se li mem ne estis sub spirita inspiro verkante.

La sciencisto, en la romano, jam antaŭ lia forflugo al Marso, asertas, ke la Marsanoj havas *ion* komuniki al la Teranoj, kio “povus kuraci la disrompitan, malsanan socian ordon kaj haltigi la sensencan marŝadon al amasbuĉado.”

Sed de sia flanko la Marsa popolo ne povas forflugi sur la Terglobon por admoni ke la homaro ŝparu al si tian tragedion, ĉar “estas kontraŭ la Kosma Leĝo por loĝantoj de la diplomitaj mondoj, fari antaŭtempajn vizitojn al tiuj junaj mondoj, kie la lernejoj tagoj kun neperfektaj estas ankoraŭ ne finitaj.”

La aserton, ke la aŭtoro estas spiritismema, firmigas lia priskribo pri la Marsa vivo, ke “la marsa menso estas tiel sensimpresige disvolvita, ke kiam du aŭ pli el ili estas kune, iliaj pensoj estas interŝanĝitaj per emocipovo, sen la malrapida perado de elparolataj vortoj,” kaj ke “eĉ kiam individuoj estas malproksime apartigitaj, ili povas direkti siajn pensojn unu al la alia tute facile per telepatio.” Li profete skribas, ankaŭ, ke “iam estonte, kiam niaj teraj mensoj forĵetos la feĉon de volupteco kaj malbono, ili fariĝos tiom sensimpresige-emaj, ke simila telepatia kapablo estos ĝenerala doto de ĉiu.” (Ĉi tie la profeteco de l' aŭtoro senmaskigas sin, ĉar li devus skribi: *vijaj* teraj mensoj anst. *vijaj*, ĉar tiuj ĉi estas la vortoj de Marsano!) Li certe malkovras parton de vero pri la Spirita Mondo, skribante, ke estas “nenia memorigo pri aĝo, neniu aĝa grizharulo, neniu paro da okulvitroj, neniu kriplulo sur lambastonoj, neniu pala, malsana, malfeliĉa vizaĝo, nek estis infano aŭ nematuraj junuloj.”

La du scivolemaj vizitantoj en Marso havis la okazon vidi la “Filmon pri Tempo” kiu antaŭbildigas ĉion, kio iam okazos sur la Tero, sed kio jam estis okazinta en Marso. Kvankam la Marsanoj vivas nun komforte en paradizaj medioj, ili ankaŭ spertis suferegojn, kiajn ni travivas hodiaŭ sur la tero; ni estas en la “prepara lernejo sub

malperfekteco.” Sed se la Malsanoj estas tiel evoluantaj spirite kaj progresintaj maŝinteknike, kaj se la interkomunikado estus tiel facila inter ambaŭ planedoj, kial ili ne bonvolus konvinki la Teranojn pri la senutileco batali inter si? Al tiu ĉi demando, la Malsano respondas, ke tio ne estas ebla, klarigante, ke la suferoj estas neevitebla procedo dum la periodo de prepara travivaĵo aŭ lernado, kaj sen suferoj, la homaro “ne *pli* povus ĝui la fruktojn de Paradizo, ol kreitaĵo senmensa kaj senkomprena pri beleco povus ĝui aferojn, *kiuj* allogas [antaj] spiritan komprenon kaj *estas* percepteblaj nur per menso.” Kial? Ĉar “inteligento estas amasiĝo de personaj travivaĵoj, kiuj estas fiksataj en la memoro, pli malfrue uzata laŭ la stadio de konscio,” kaj “nur per kontrastoj ni povas fariĝi konsciaj pri la belaj, bonaj kaj amindaj aferoj de nia ekzistado.”

Tra la libro abundas tiaj spiritaj instruoj. La aŭtoro ne forĝesis spici la romanon ankaŭ per amo, kiu burĝonis inter la ĵurnalisto kaj beleza Marsanino.

LINGVAĴO. Kvankam la “originala” romano, mi sentis kvazaŭ mi legus tradukaĵon el la angla lingvo. “Li komencis turni la radojn, *nun* unu, *tiam* alian” (p. 137 kaj aliloke): Pli bone diri, “jen unu, jen alian.” Ĉu estas slango la esprimo, “Via klarigo estas maldika saŭco” (p. 16)? Kio estas “jenflankuloj” (p. 8) kaj “jenflanko de Suno” (p. 24)? La uzmaniero de l' korelativaj vortoj ne estas ortodoksa kaj ofte erara. Kelkfoje la vortordo malfaciligas la legadon. Unu ekzemplon.

“Sed ĉi tiuj (kelkaj majestaj konstruaĵoj sur la Terglobo) de milionoj da homoj dum (*Suben al la sekvanta paĝo.*)

GAZETOJ RICEVITAJ INTERŜANGE

(La plej laste ricevitaĵoj n-roj indikitaj)

★ American Esperanto Magazine, Jan-Feb. ★ La Juna Vivo, Jan. ★ Sennaciulo Feb. ★ El Popola Ĉinio, Feb-Marto ★ Internacia Bonhumoro, n-ro 2 ★ Informletero (Aŭstrio), Jan. ★ Argentina Esperantisto, Sept. ★ La Ponto, Jan. ★ Informilo de J.G.E.L., n-ro 1 ★ La Ĝusta Vojo, Dec. ★ Boletín, n-ro 12 ★ Heroldo de Esperanto, n-ro 1153 ★ Esperanto en Skotlando, n-ro 16 ★ Semisto, n-ro 12 ★ The Greater World, n-ro 1236 ★ Children's Greater World, Feb. ★ Esperanto (U.E.A.), Feb. ★ La Ĉenero, Feb. ★ Laborista Esperantisto, Feb. ★ La Rondo, Jan-Feb. ★ Newsletter, Jan. (World Student Federalists) ★ Vroclavano, n-ro 5 ★ La Esperantista Laboristo, Jan-Feb. ★ La Praktiko, Jan-Feb. ★ Dia Regno, Jan-Feb. ★ Helena Esperantisto, Sep-Dec. ★ Dansk Esperanto-Blad, Jan-Feb. ★ Arbetar Esperantisten, Sept-Okt. ★ Amip, n-ro 3 ★ Malgranda Revuo, n-ro 4 ★ Esperantista, Sept. ★ Esperanto-Servo, n-ro 7 ★ Across Frontiers, Sept. ★ Neugeisto, Feb. ★ La Studento, n-ro 2 ★ Verda Stelo, n-ro 9-10 ★ Bulteno (Germana Esp-Asocio), n-ro 21 ★ Ekonomia Egaleco, n-ro 10 ★ Newsletter (World Fellowship of Buddhists), n-ro 3 ★ Svenska Esperanto-Tidningen, Sept-Okt. ★ Franca Esperantisto, Okt-Nov. ★ Eta Heroldeto, Marto ★ La Skolta Mondo, Okt. ★ La Vivo, Jul-Sept. ★ The British Esperantist, Jan-Feb. ★ La Budha Lumo, n-ro 30 ★ Nederlanda Esperantisto, Feb. ★ Samideano, n-ro 12 ★ Cirkulero (F. E. S.), Feb. ★ La Revuo Orienta, Aprilo ★ Voĉo de Tajimi, n-ro 3 ★ Verda-Haveno Otaru, n-ro 7 ★ La Verdano Pacon, n-ro 2 ★ La Torĉo, Marto ★ La Movado, n-ro 13 ★ La Ĝojo, n-ro 1 ★ Kajero Socia, n-ro 3 ★ Tagiĝo, n-ro 2 ★ Libera Komunismo, n-ro 7 ★ Junaj Herboj, n-ro 2 ★ La Skolta Mondo, Jan. ★ Semu Konstante, n-ro 39 ★ La Horizonto, n-ro 5 ★ Frateco, n-ro 2 ★ Informilo (K. E. L.) n-ro 2 ★ The Worka Esperantist, Jan-Feb-March ★ La Semanto, Jan-Feb.

(De p. 63) jardekoj tiel admiritaj estis kompare kun la Marsa arkitektura kreaĵo tiam sub mia vidokampo, kiel krudaj dometaĉoj de sovaĝuloj apud la rekreita, vasta beleco de la Katedralo de Amiens." (p. 80)

Nur la vortorda ŝanĝo multe pli faciligus nian komprenon kiel jene:

"Sed kompare kun la Marsa arkitektura kreaĵo tiam sub mia vidokampo, ĉi tiuj (ter-mondaj konstruaĵoj) tiel multe admiritaj de milionoj da homoj dum jardekoj estis kiel krudaj dometaĉoj

de sovaĝuloj apud la rekreita, vasta beleco de la Katedralo de Amiens."

Papero kaj bindo estas bonegaj, kaj la presado ankaŭ ne estas malbona, sed ĝena estas sporada foresto de unuopaj preslitoj kvazaŭ dentmanko en vicoj da dentoj.

Malgraŭ ĉio, al ĉiuj, kiuj havas seriozan konsideron pri Daniel 11 kaj Apokalipso 18, kaj ankaŭ al sciencemuloj mi sincere rekomendas la traŭgordon de tiu ĉi serioza romano. Dan Rak.

